

Lingvo Internacia



Duonmonata gazeto

por

Esperanto

eliranta la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato

~~~~~  
*XI-a Jaro*  
~~~~~

PARIS V°

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, Rue Lacépède, 33

ONI ABONAS L. I. ĉe :

a) oficejo de la gazeto en **Paris**, — b) S-ro *P. Ahlberg*, Sekretario de Klubo Esperantista, en **Stokholm**, (Svedlando), Döbelnsgatan 50, — c) S-ro *Manuel Benavente*, Sociedad 14, **Murcia**, (Hispanlando), — d) S-ro *K. Ostanievič*, «Kontoro Esperantista», en **S.-Peterburg** (Ruslando) Jaščik 80, — e) Societo «*Espero*» en **S.-Peterburg** (adr. D-ro *A. I. Asnes*, Bolšaja Podjačeskaja, d. 24. kv. 12.), — f) Firmo *Möller & Borel*, Prinzenstrasse 95, **Berlin S.** (Germanlando), — g) Firmo *J. Lindauer'sche Buchhandlung (Schöpping)*, Kaufingerstrasse 29 **München** (Bavarujo). — Oni sendu abonmonon nur al unu el tiuj ĉi sinjoroj resp. firmoj, aŭ al redakcioj de gazetoj aŭ sekretarioj de grupoj esperantistaj.

Jara abono : sen literatura aldono 5 frankoj, kiun sumon oni sendu laŭeble per poŝta mandato. (Por papermonoj ni kalkulas : 5 frankoj = 2 rubloj = 4 germ. markoj = 4 ŝilingoj = 1 dolaro = 2,50 hol. floreno = 4 skand. kronoj = 5 aŭstro-hungaraj kronoj.) — Kun literatura aldono 7,50 fr.

Prezo de ĉiu numero 40 centimoj.

Pago por anoncoj : 40 centimoj por linio (kompostita el «petit» pres-literoj); ĉe pli granda anoncado estas donata rabato laŭ reciproka konsento. Malgrandajn nekomercajn anoncojn ni presas por niaj abonantoj po dudek centimoj por linio. Rabato por almenaŭ ses presoj : 10 %.

La ŝanĝo de adreso kostas 50 centimojn.

Poŝtmarkoj estas akceptataj nur por $\frac{3}{4}$ de ilia valoro.

POŝTA KESTO

L. C. — Se vi tiel bone konus la regularon de versfarado, kiel malbone vi konas la gramatikon Esp. nun via poemo eble ne riĉigus la enhavon de l'paperkorbo.

HELSINGFORS, Finlando, *Martin & Mäkelä*, librejo (adr. : It. Wiertotie 6, Felef, 5434, rekomendas sin al la finlandaj Esperantistoj.

Hjalmar Bäckström, en *Saltsjöbaden* (proksime Stockholm), Svedujo, ricevas ĉiuspecajn komercajn komisionojn.



INTERNACIA SIGNO

aprobata de grupoj kaj societoj en Kanad-, Anglo-, Belg-, Franc-, German-, Hispan-, Aŭstro-, Fin-, Itallando, Siberio k. a. rekomendata de S. F. p. p. E., butontraŭa, broĉa, kravata, ricevebla ĉe ĉiuj Grupoj Esperantistaj : 1 franko. — Rabato al la grupoj por almenaŭ 12 : 20 % . — Sin turni al S-ro

Emile P. GASSE, 105, Lycée, Le Havre, Franclando.

Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio **PARIS**, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

15 novembro 1906

J. Parisot. — Ritma akcento en versoj 613

Javal. — Songo de blindulino . 619

Tra la mondo esperantista :

Projekto, de ROMANO FRENKEL (*daŭrigo kaj fino*) 620

Movado esperantista 623

Nia aldono literatura (paĝoj 337—352) : **La Ruĝa Kruco**, de EMILA PARDO-BAZAN (tradukis M. DAVID). — **Sinjorino Ursule** (tradukis PAUL TABUSSE), *komenco*.

Ritma akcento en versoj

La celo de la jenaj paĝoj estas elserĉi, kiel gramatika akcento, ricevita en Esperanto per aldono de finiĝo al radiko, fariĝas, el simpla vorfara ilo, ritma elemento de versoj.

Se sonoj silabaj sekvas unu la alian unuforme, orelo nenian ritmon komprenus ⁽¹⁾.

Por ĝin difini, estas bezone, ke oni povu starigi iajn dividojn.

Tio fariĝos, ne per tona altigo kaj malaltigo, nek per ŝanĝo de vokalo aŭ konsonanto, nek per pli aŭ malpli hela sono, nek per la sola daŭro de la silaboj (tiuj elementoj estas unuj indiferentaj al la ritmo, la aliaj ne sufiĉaj), sed per reveno perioda de fortaj kaj malfortaj tempoj ⁽²⁾.

(1) Tiaj versoj, laŭ G. PARIS, estus kvazaŭ « senanima korpo. *Lettre à M. Léon Gautier*. Bibliothèque de l'École des Chartes, t. xxvii, 1866, p. 585.

(2) Oni trovos difinojn de la ritmo ĉe Aristido Kvintiliano (Meibomius, t. II, p. 31), A. S. H. VINCENT, *Notices sur divers manuscrits grecs relatifs à la musique*. (Notices et Extraits des Manuscrits de la Bibliothèque du Roi, publiés par l'Institut royal de France, t. xvi, Paris, 1847, p. 197, sekv.). BURETTE, *Dissertation sur le rythme* (Mémoires de l'Académie des Inscriptions et Belles-Lettres. t. v. p. 161, sekv.).

Fortaj kaj malfortaj tempoj, aŭ akcentaj kaj neakcentaj silaboj, elfaras piedon tonan aŭ ritmajn.

Cia piedo, en sia stato regula kaj norma, komenciĝas de la tempo forta. Aliyorte: tempo forta difinas la iradon de la verso, efikante sur unu aŭ du silabojn sekvantajn post ĝi: a) / (— ∪), aŭ b) / (— ∪ ∪). Post io, alia tempo forta estas bezona por doni reenpuŝon, kiu same efikas sur unu aŭ du tempojn malfortajn kaj refaras la ritman movon:

a) / | / | /
 b) / | / | /

Tamen, ĉar Esperanta akcentiĝo estas paroksitona, tiu ĉi lasta ritmo donus finiĝon neeblan; ĝi do fariĝas devige:

a) / / /

Ĉiuj silabaj kunmetaĵoj revenas al du fundamentaj ritmoj: duopa kaj triopa, kies elementoj formas la aliajn devenaĵojn kvar-, ses-, kvinopajn, k. t. p.

Duopa ritmo efektiviĝas en la marŝa movo. Ĝi estas la ritmo en ĝia plej simpla modo, la plej antikva kaj plej universala. Oni ĝin trovas en la pratempo de ĉiuj modernaj sistemoj (3).

En versoj, ĝi elformas sin laŭ tiu principo, ke « homa voĉo regule kunmetas fortajn kaj malfortajn silabojn tiel ke, post kiam la ĉefa akcento de vorto (a) estas per propraj leĝoj difinita, la vokalo, kiu senpere sekvas (b) aŭ antaŭiras (c) tiun akcenton, fariĝas nepre pli malforta, ol la dua (d) kaj antaŭa (e) (4). Ekz.:

e c a b d

Li mal-ap-er-is ĉe la koka krio (Hamlet, I, 1).

Son-or-il-oj de vespero (Grabowski, F. K. 365).

El tio sekvas: 1-e, ke du akcentoj regule ne intersekvas. Kiel, laŭ la gramatiko, radikvorto ricevante sufikson perdas sian akcenton (Ekz.: du, due, duoble, duobligite), tiel, en kunmetataj radikvortoj, unu ero radika fariĝas senakcenta:

al la tutmonda harmoni' (Z., F. K. 332).

lipharon; eble ne timulo (Devjatnin, F. K. 338).

(3) G. Paris, lettre citita, p. 585.

(4) Samloke, p. 584.

2-e Unusilabaj vortetoj post aŭ antaŭ akcento restas senakcentaj:

de mia **o**nklo, frat' de mia pa**a**tro (H. I. 2).

ĉu po**r**tas ili krom la mi**r**oj (Goldberg. F. K. 355).

Male, inter du sentonaj silaboj, ili alprenas akcenton:

transi**r**is en pose**d**on de l'venk**i**nto (H. I. 1).

en labo**r**o pa**a**ca ne lac**i**ĝos (Z., F. K.)

3-e. En versfarado, akcentaj radikoj proksimigitaj al alia akcento perdas sian forton:

l'In**f**eron vo**k**i? Fi, halt', n**i**a ko**r**o (H. I. 5).

kor' m**i**a, sed sil**e**ntu m**i**a bu**ŝ**o (H. I. 2).

4-e. En kunmetitaj vortoj, akcento, kiu regule sekvas la gramatikan regulon:

laŭ la kontr**a**kto antaŭsigel**i**ta (H. I. 2);

perdas tamen la plilaŭtigon en certaj okazoj, ĉu tial ke ĝi antaŭenpuŝiĝas por eviti renkontigon de du akcentoj:

en l**i**a v**i**vo duon**i**gre gr**i**za (H. I. 2);

ĉu tial ke la ritma forto simple alilokas la flankan akcenton:

antaŭpar**o**loj de tre po**k**aj po**e**toj (H. I. 3).

Ritmo triopa devenas de la duobla per duobligo de unu el la du eroj ⁽⁵⁾. Ĉar ĝi sin alfaris plibone ol la duopa al la karaktero de la Okcidentuloj, kaj ĝi estis al ili pli facile versigebla, ĝi regnis en Grekujo kaj pli malfrue en Eŭropo.

Same kiel duopa movado regas du silabojn, tiel la triopa kunigas tri

g e c a b d f

li malsan**i**gis la militist**a**ron, mort**a**dis pop**o**loj (Kaufman, F. K. 441)

Pri la kunmetitaj vortoj, oni observos saman procedon, kian en dumetra verso :

al rabob**i**rdoj kaj hund**o**j; far**i**ĝis la vo**l**o de Ze**ŭ**so. (Kaufman, F. K. 441),

Versa finakcenta, aŭ « vira », pravigita de la gramatiko, kiu akceptas, ĉe la fino de frazaj membroj, vorton unusilaban ne apartiĝas al tiuj reguloj. Ĝi estas nur devenaĵo aŭ malpliigo de la verso paroksitona. Efektive, oni ĝin ricevas per forigo de la lasta duonpiedo, ĉu almetante unusilaban vorton, ĉu eliziante

(5) Same kvinopa ritmo devenas de la kvaropa, kies lasta tempo estas duobligita.

la substantivan finiĝon. Tiamaniere la verso « vira » finiĝas per neplena piedo, kaj ĉia ĝia figuraĵo respondas al ia plena paroksitona verso:

/ / / / sur la kampo la rozet'
 / / / / knabo vidis, jen rozeto (Z. FK. 325).
 / / / / feliĉon mi havas de vi
 / / / / vi, klara, trankvila vespero (Zeitlitz, 403).

Pri tiuj versoj oni konstato ke D-ro Zamenhof, konservante al la akcento ĝian plenan rolon, uzas unusilaban vorton finnan nur en tempo forta.

Estu kun li (Z. FK 329).

Alaŭdoj kantas super mi (FK. 332).

Vi estas pala, tremas. Ĉu ne pli (H. I, 2).

Ĉu Horacio? Peco de li mem (H. I, 1.)

Aliaj versfaristoj ĝin metas en finiĝo ina.

Ni nun vidu, kiel mezuriĝas versoj faritaj el tiuj piedoj.

Konsiderante la grandegecon de la lasta silaba membro (piedo), kiu estas tona regulilo de la verso, ni trovas:

i-e ke ĉiuj versoj proksitonaj duopemovaj konsistas nur el troĥeoj (6) tonaj, kaj ĉiuj proksitonoj triopemovaj konsistas nur el amfibrakaj tonoj.

(6) Alprenante la metrikan terminaron, oni ne devas forgesi, ke la fortaj (akcentaj) kaj malfortaj (neakcentaj) silaboj tute ne reprezentas la longajn kaj mallongajn vokalojn de la metrikistoj. Ekzemple, la distingigo inter jambo kaj troĥeo jam nenion valoras en la tona ritmo. Tiuj « piedoj », diversiĝis unu de la alia per la loko de la « bato », kiu frapis la silabon longan de la troĥeo:

/ u | / u | / u |
 — — | — — | — — |
 1 2 3 1 2 3 1 2 3

kaj, renversite, la silabon mallongan de la jambo:

/ — | / — | / — |
 u — | u — | u — |
 1 2 3 1 2 3 1 2 3

Sed, ĉar la tona versfarado ne havas mallongajn akcentajn vokalojn, tiu diferenco ne plu efektiviĝas, kaj ambaŭ sistemoj unuforme revenas al / | / | / , simpla alterno da fortaj kaj malfortaj silaboj, kiujn oni povas nomi, por manko de plibona nomo, « troĥeoj tonaj ». Same pri tritempaj piedoj.

2-e. Tiu fina akcentiĝo kaj ne la pareco aŭ la malpareco de la nombro da silaboj, difinas la ritmon. Sekve, la verso estas mezurota returnenire, kaj ni devas preni por aldono aŭ krommezura silabo, ne la lastan, sed la komencan. En tiu okazo, ritmaj membroj komenciĝos per silabo malforta, t. e. supreniros al la akcento, laŭ jenaj figuraĵoj:

c) | / | / | /

d) / | / | /

e) | / | / | / .

La unua c) elfaras ne jambojn, sed troĥeojn, kiel la ritmo a) (supre). Tio tute klariĝas, se ni komparos la Hamletan version kvinakcentan dekunusilaban kun la kvinakcenta deksilaba:

/ ⁵ (— ∪⁵) En la m**o**ndon ve-nis n**o**-va se**n**-to.
(Z. Fk. 317).

., / ⁵ (∪ , — ∪⁵) Or-d**o**-nu nun kom-**e**nc-i la paf-**a**d-on.
(H. v. 2 »»).

Ambaŭ malsimilas ja nur per ilia komenco, ne per ilia fino.

Same la ritmoj d, e, alfaras, kiel b, amfibrakojn, ĉar, reguligite de la finiĝo, daktiloj kaj anapestoj komencaj estas nur amfibrakoj manĝkaj aŭ supersilabaj.

/ ⁴ (∪ — ∪⁴) mi t**a**ge du blu-ajn oku**l**-ojn adm**i**r-is
(Trioletto).

/ / ³ (— ∪ , ∪ — ∪³) **O**ni lin port-is al to**m**bo
sen**v**orte (H. iv, 5)

/ ⁴ (∪ , ∪ — ∪⁴) tre pot-**e**nc-a ĝi **e**stas la rev-o
flug**a**nta (Seloznet, F. K. 386).

Rimarku, ke en tiu lasta ekzemplo, la unua silabo, kiun ne reguligas antaŭmetata silabo, estas plibone neŭtra (7). Efek-

(7) Se, teorie, silabon fortan antaŭiras unu aŭ du malfortaj, tri ne povas. Sekve, la jena verso:

Mizeregulo de l' tero . . .
ni tra la m**o**nd' sen esp**e**ro (C. Bourlet, *Espérantiste*,
vi, 03, ne estos notataj . / / , sed / . / / .
(aŭ . / / /)

Komparu :

Kuŝas som**e**ro la var**a**ma (Kanaloŝŝy-Lefler, Fk. 368)

Sarkas knab**i**no kan**a**bon (Lorenc, Fk. 383).

tive, tiaj versoj komencas ĉu per neŭtrala vorto, ĉu per akcenta silabo. Komparu:

malfelĉon elportas sen plendo, sen vorto...

multajn premas kun forto mizer', malespero (samloke).

Sur la korton alvokas tri filojn...

Litvaj dioj kondukis vin, benu! (Grabovski, F. K. 360).

Resume, la rolo de la akcento en versoj ŝajnas konformigi sin al jena regularo:

I. Oni kalkulas silabojn kiel tonajn aŭ sentonajn, ne distingante ilin.

II. Tiuj silaboj alternas formante duopajn aŭ triopajn membrojn (piedojn).

III. Ĉefa akcento ritma kuniĝas kun akcento gramatika.

IV. Flankaj akcentoj dependas de akcentoj ĉefaj, je interspaco de unu aŭ du silaboj.

V. Verson reguligas la lasta akcenta grupo; tiel supernombraj silaboj sin trovas ĉe la komenco.

Tion mi proponas, ne kiel novan aŭ elpensitan teorion, sed tre simplan elmeton de faktoj, kiu tute praviĝas, konforme al la lingvo mem, la praktikon de niaj versfaristoj.

J. PARISOT.

Ezopa fabelo — nuntempa

Unu azeno trovis leonan felon. Ĝi ricevis la ideon, vesti sur sin la felon, kaj ŝajnigante sin leono, terurigi la homojn kaj bestojn. Pensite, farite. La azeno ŝajnis esti potenca leono.

La unua viva estaĵo, kiun ĝi renkontis, estis malriĉa sed talenta komercisto, portanta kelkajn komercaĵojn sur sia dorso. Li terurigis vidante la leonon, kio tre amuzis la azenon. Nun la azeno, intencante pligrandigi la efikon, ekblekis: — ia — ia — ia — ... Sed jen nia komercisto rekonis la azenon pri ĝia voĉo, kaptis ĝin kaj devigis ĝin — vendi malkarege la leonan felon.

H. M. DECULO.

SONĜO DE BLINDULINO ⁽¹⁾

« Kiam dolĉa dormo enkondukas songon,
Mi revidas tion kion mi jam vidis;
Nur noktiĝo por mi alportas la tagon
Kaj mi tiam vivas kiel mi jam vivis.

« Malklaraj estaĵoj, divinataĵaro,
Ĉio eknetiĝas, ĉio malkaŝiĝas,
Aperas la lumo, la dia naturo,
Amatajn vizaĝojn mi rigardadas;

« Kiam mi ravita, vekigĝas denove,
Kiam mi retrovas mallumon kutiman,
Kune songo, vivo, konfuziĝas. Ho ve!
Realeco naskas la songon ĉagrenan.

« Koro Kuraĝu ⁽²⁾ ».

« Mi ne plu vidas belegajn rozojn
Sed, kiel ĉiun, Dio min zorgas.
Koro kuraĝu! ĝuu l'animojn;
Mi ne plu vidas belegajn rozojn
Sed ilin flaras.

« Cia mankadas ama rigardo,
Kvankam kareson ĝian mi sentas.
Koro kuraĝu! For la bedaŭro!
Cia mankadas ama rigardo,
La kiso restas. »

(1) Montraĵo el la libro « *Inter Blinduloj* » de doktoro Emilo JAVAL, esperantigita de lia bofilino S-ino Jean JAVAL, ĵus elirinta el la presado.

(2) La titolo estus laŭtekste jena: *Cu estas iel grave!* Sed ĉar la titolaj vortoj ripetiĝas dufoje en la poezio mem, tial la tradukantino preferis ŝanĝi ilin. Kompreneble la titolo frazo en laŭteksta formo ne estus taŭge enigebla en deksilaban version.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

PROJEKTO

pri la fondo de : « Tutmonda Ligo de Instruistoj por propagando de Esperando inter junuloj kaj infanoj, precipe inter la gelernantaro tutmonda ».

(daŭrigo kaj fino).

3) *Organizado de la korespondado inter instruistoj kaj lernantoj de la tuta mondo.*

Krom la presado de adresoj de instruistoj aliĝintaj al la ligo kaj de iliaj lernantoj en la oficiala organo de la ligo la komitato de la ligo devos ĉiujare eldonadi zorge korektitan adresaron de instruistoj kaj lernantoj dezirantaj korespondadi, aldonante ĉiam la daton de naskiĝo de la lastaj. Kompreneble krom la lernantoj de instruistoj aliĝintaj al la ligo ĉiu junulo kaj infano-esperantisto povas esti enskribita en ĉi-tiun adresaron.

4) *Eldonado de libroj por junuloj kaj infanoj.*

Nia infana kaj junula literaturo esperanta estas bedaŭrinde tre malriĉa. Unue ni devas eldoni lernolibrojn kaj krestomation por la infanoj. Grandan utilon povus alporti eldonado de malgrandaj rakontetoj por infanoj en formato de ŝlosiloj « Ĉefeĉ » kaj de la sama prezo. Oni povis peti sinjoron Ĉefeĉ, ĉu li konsentus preni sur sin tiun-ĉe lastan eldonadon. Tiujn-ĉi « rakontetojn-ĉefeĉojn » pro ilia malgranda prezo oni povus en granda amaso dissendadi kaj disdonadi kune kun ŝlosiletoj-ĉefeĉoj. Mi tre petas ĉiujn esperantistojn sendi al mi (Romano FRENKEL, inspektoro de gimnazio, *Enisejsk*, Rusujo, Siberujo) materialojn por la krestomatio (tradukoj el iliaj naciaj krestomatioj por la infanoj) kaj por la « rakontetoj-ĉefeĉoj ».

5) *Organizado de ĉiujaraj kongresoj de ligoj.*

Ili povus efektiviĝi kiel fakoj de ĉiujaraj kongresoj esperantistaj. Kompreneble la instruistoj, se eble, prenos kun si siajn lernantojn.

6.) *Organizado de vojaĝoj de la lernantoj kun instruistoj en fremdajn landojn dum la libertempo.*

La ligo povus peti ĉiujn fervojajn kompaniojn fari rabaton por la vojaĝantaj instruistoj kaj lernantoj, precipe kiam ili vojaĝas po grupoj. La esperantistaj grupoj en ĉiuj landoj povus preni sur sin zorgon pri la travojaĝantaj ilian urbon. La lernejoj en ĉiu urbo povus doni loĝejon al siaj fremdlandaj gastoj, kion ili ĉiam faras ĉe ni en Rusujo dum la vojaĝoj de lernantoj. La rusaj fervojoj ofte senpage transportas ekskursantajn (t. e. vojaĝantajn) lernantojn de rusaj registaraj lernejoj.

7.) *Fondo de internaciaj kolonioj en ĉiuj landoj, kie la instruistoj kaj lernantoj povos pasigi la libertempon en rondo de siaj amikoj ĉiulandaj, kaj de « Centra Esperanta Hejmo de tutmonda Instruistaro kaj Lernantaro ».*

Por la komenco sufiĉus, ke la ligo eldonus ĉiujare adresaron de loĝejoj, kie la instruistoj kaj lernantoj povus havi pro malgranda prezo ĉu loĝejon, ĉu plenan pensionon. Kelkaj lernejoj el diversaj landoj, kelkaj instruistoj, lernantoj povus per korespondado grupiĝi, fiksi lokon en kiu ili renkontiĝos dum la somero, kaj la ligo donos al ili ĉiajn bezonajn konsilojn.

Kompreneble ne ĉio proponita povas tuj esti efektivigita, same kiel la vivo povas doni ion de mi neantaŭviditan. La programo estas nur provizora.

La detala regularo de la ligo povas esti ellaborita dum la dua kongreso esperantista, kie oni ankaŭ, se la ligo efektiviĝos, povus elekti la komitaton, la honoran prezidanton, prezidanton, vic-prezidanton, sekretarion k. t. p. Miaflanke mi proponas jenon:

1.) Ĉiu esperantisto, ĉu instruisto — ĉu ne, povas fariĝi membro de la ligo, se nur li deziras ial helpi la disvastigon de esperanto inter instruistaro kaj junularo-infanaro lernanta.

2.) La membroj povas esti:

a) *Membroj aktivaj.* Membro aktiva estas ĉiu ligano, kiu ial helpas la disvastigon de nia lingvo inter instruistoj, junuloj kaj infanoj, ĉu per instruado, ĉu per propagando, ĉu per korespondado internacia k. t. p.

La kotizaĵo. Kvin frankoj ĉiujare (5 fr.)

b) *Membroj aprobantaj.* Membro aprobanta estas ĉiu ligano, kiu, aprobanta la agadon de la ligo, pro manko da tempo aŭ pro alia kaŭzo ne povas ludi aktivan rolon en la propagando.

La kotizaĵo: Kvin frankoj ĉiujare (5 fr.)

c) *Membroj bonfarantaj.* Membro bonfaranta estas ĉiu ligano, kiu pagas ĉiujare kotizaĵon ne malpli ol dek (10) frankoj.

d) *Membroj-propagandistoj.* Membro propagandisto estas ĉiu ligano, kiu varbis ne malpli ol kvin anojn de la ligo.

La kotizaĵo: Kvin frankoj ĉiujare (5 fr.)

e) *Membroj honoraj.* La membroj honoraj estas elektataj unufoje por ĉiam per voĉdonado de ĉiuj liganoj, same kiel la honora prezidanto. Estu la honora prezidanto de nia ligo, nia kara majstro L. Zamenhof, la genia aŭtoro de esperanto.

3.) Ĉiuj liganoj senpage ricevas la oficialan organon de la ligo Mi proponas peti sinjorojn E. Privat kaj H. Hodler, ke la gazeto « Juna Esperantisto » fariĝu oficiala organo de la ligo kaj ke la redakcio de tiu-ĉi gazeto fariĝu la sidejo de komitato de la ligo.

Ĉiujn esperantistojn dezirantajn aliĝi al la ligo mi petas, ĝis la komitato estos elektita, kaj komencos funkciadi, sendi la aliĝojn al mi (Al S-ro Romano FRENKEL, *Enisejsk.* Rusujo, Siberaĵo.)

Krom tio mi tre petas sendi al mi:

1.) Adresojn de lernejoj, instruistoj, lernantoj — ĉu esperantaj, ĉu ne — aldonante pri tio en la adreso.

2.) Adresojn de ĉiuj aprobantaj mian projekton.

3.) Fotografaĵoj de instruistoj kun iliaj lernantoj.

4.) Vidaĵojn de lernejoj, klasoj, kabinetoj k. t. p.

Kompreneble mi interŝanĝe sendos la samon.

Aliĝu do, samideanoj, konigu mian projekton al ĉiuj instruistoj kaj lernantoj en via urbo, al ĉiuj viaj korespondantoj. La fundamento de esperanto jam estas konstruita — nun ni devas komenci la konstruadon de ĝia palaco!

Romano FRENKEL.



MOVADO ESPERANTISTA

Skota

Dundee. — Ni ĝojas sciigi ke Esperantista Klubo ĵus fondiĝis en la granda komerea urbo Dundee. La 23-an de oktobro en Lamb's Hotel okazis kunveno aranĝita de Esperantistoj 8,223 kaj 11,264. La ĉambro estis plene, kaj kelkaj ĉeestantoj ne povis trovi seĝojn. Fraŭlino Hing, konata Dundee'a ĵurnalistino prezidis, kaj faris interesplenan paroladon pri la naskiĝo kaj disvastiĝo de Esperanto, kaj la granda sukceso de la Geneva Kongreso. Poste ŝi proponis ke Esperantista Klubo estu fondata. Sinjoro Alex. Pride subtenis la proponon, kaj ĝi estis akceptata aklame. Oni elektis la sekvantan oficistaron: Hon. Prezidanto: S-ro Jean Duchêne; Prezidantino: Fraŭlino King; Sekretario: S-ro Alex. Pride, Rosebank, Errol, Perthshire; Kasisto: S-ro G. I. Stephen. La grupo kunvenas ĉiumerkrede, kaj estas aliĝita al la Brita Esperantista Societo. La estraro konsistas el entuziasmaj Esperantistoj, kaj oni esperas ke ili sukcesos vekti la intereson de la koemrcistoj en Dundee.

Aberdeen. — Je la fino de Septembro lasta, en Aberdeen, Skotlando, estis grandaj festoj okaze de la kvarcenta datreveno de la fondiĝo de la Aberdeen'a Kolegio. Samtempe la Gereĝoj Eduardo kaj Aleksandra vizitis la urbon kaj ceremonie malfermis novan aldonon al la Kolegio, starigitan je la kosto de £ 220.000. La festoj vekis grandan intereson tra la mondo, kaj delegitoj de la precipaj universitatoj ĉeestis. La skotlanda gazeto « Scottish Review », faris uzon el la okazo por sciigi la opiniojn de la alilandaj profesoroj pri diversaj temoj. Eble unu el tiuj interesos la Esperantistaron. Ĝi estis skribita de Profesoro Wilhelm Ostwald LLD, hon. FRS., el Leipzig. Li diris: « Tio kion mi rimarkis unue ĉe la Aberdeen'aj ceremonioj estis ilia internacia karaktero. Invitoj estis senditaj al, kaj akceptitaj de scienculoj tra la tuta mondo. Kaj en kelkaj kunvenoj oni povis vidi ke la internaciaj rilatoj ne estis tiam

formitaj unuafoje. La samaj personoj kiu renkontis tie ĉi unu la alian, jam renkontis antaŭe en Berlino aŭ Rome, en St. Louis aŭ Genevo. Estas nedubebe ke la scienculoj estas je la nuna tempo, kiel ili estis antaŭ tri cent jaroj, la plej internaciaj el homoj. Tio estas tute natura, ĉar ne estas io tiel sendependa de lando, gento, kaj religio, kiel la scienco. Tial la ideo de internacia paco ne havas pli fortajn partianojn ol la scienculojn. La granda malhelpo al tiu profita ideo estas la malsameco de lingvoj. Mi ne povas diskuti tiun ĉi aferon tie ĉi.

Mi nur esprimas mian fortan konvinkon ke tiu problemo estas solvota per internacia helpa lingvo kiu estos dua lingvo por ĉiu persono. Esperanto estas jam pruvita sin tre taŭga por tia uzado. »

ALEX. PRIDE.

Hungara

Cirkulero de la Organiza Komitato de la Ekspozicio Internacia Stenografia Szegeda.

Ni havas la honoron inviti la anojn de ĉiuj stenografiaj metodoj, ĉiujn stenografiajn societojn kaj gazetojn, kaj la samideanojn sin interesantajn je stenografio al la *internacia kaj intermetoda stenografia Ekspozicio*, organizota de la *Szegeda Stenografia Societo* je la printempo de 1907 en Szeged (de 15-a de marto ĝis la 31-a). La ekspozicio estos kunligita kun tutlanda stenografia Kongreso kaj skribkonkurso.

Ni ekzpozicios ĉiujn stenografiajn verkojn, librojn aŭ gazetojn, manuskriptojn kaj stenogramojn, ĉiujn stenografiajn industriobjektojn, kajerojn, kraĵonojn, plenigeblajn plumojn, skribmaŝinojn, bildojn koncernantajn al stenografiismo. Multaj premioj estos disdonataj en la ekspozicio kaj en la skribkonkurso multegaj.

La konkursoj estos organizataj hungare kaj germane, sed se de alilingvaj stenografiaj societoj ni ricevos premiojn (ĉu librojn, ĉu monon), kaj se estos kelke da konkursoj, ni organizos ankaŭ alilingvajn konkursojn. Esperantan konkurson ankaŭ ni organizos, se ni ricevos premiojn, kaj kelke da konkursantoj.

Ni do petegas niajn ĉiulandajn, ĉiulingvajn, kaj ĉiumetodajn stenografiajn fratojn, bonvolu :

1) Ensendi grandamase stenografiajn objektojn, librojn kaj gazetojn, manuskriptojn, stenogramojn ĉiulingvajn al nia ekspozicio. Cion ni ricevos kun grandaj dankoj, kaj ni zorge konservos;

2) Bonvolu aperi je ekspozicio, kaj partopreni je konkursoj kaj kongreso are, kaj inviti viajn geamikojn kaj gekonatulojn. Kiuj sciigos siajn intencojn pri la apero, ni zorgos por ili pri tute senpaga loĝado kaj en Hungarlando pri duonkosta fervojbileto;

3) Bonvolu sendi al ni mondonacojn kaj librojn, ke ni povu organizi konkursojn alilingvajn;

4) Bonvolu atentigi pri nia ekspozicio la fabrikistojn de stenografiaj objektoj;

5) Ni tre petas la plej famajn stenografistojn de ĉiuj nacioj kaj alfaristojn kaj elpensintojn de metodoj, bonvolu unu aforismon — skribatan en sia lingvo aŭ Esperante — kun sia fotografo kaj manuskripto ensendi. Ni eldonos ĉiujn en unu libreto;

6) Bonvolu ensendi — ĉu manuskripte, ĉu jam presite — la detalan kaj lastan statistikon de stenografismo de ĉiu lando;

7) Ni organizos apartan Esperantan ekzpozicion. Bonvolu sendi ĉiuspecajn librojn, gazetojn, afiŝojn kaj objektojn al nia ekspozicio;

8) Ĉiuspecajn objektojn aŭ leterojn sendu al S-ro LUDOVIKO JAKAB, *Szeged* (Hungarujo), Fertő-utca 4, — monon al S-ro KARLO SZALAY, *Szeged*, Leszámitoló hiv.

9) Estimataj samideanoj Bonvolu tutforte subteni nian ekzpozicion, subtenante kune la Esperantismon, la aferon de nia komuna trezoro !

10) La objektojn por la Esperantista Ekspozicio, bonvolu sendi al S-ro Z. BARANYAI, *Szeged*, III. ker. polg.

SZEGEDA STENOGRAFIA SOCIETO.

Franca

Vespermanĝo de Parizaj Esperantistoj.

La Lundon 12-an de novembro en la « Hôtel Moderne » ni estis 30 kaj duono. Nome Ges-oj Sebert, S-o Taval kun S-ino Le Bihan, Ges-oj Combemale kaj filo, Ges-oj Bricard, S-ino

Mouchez, S-o Benoît kaj lia filino, f-ino Gérard, f-ino Warluzel, f-ino Lutier kiu aldondukis S-on Henschell tute esperantigitan post la verpemanĝo, S-oj Astaix, Boiselle, Couturier, Detrois, Fabry, Huet, Chaussegros, Lecaron, G. Moch, D-o Odinet, Peloille, Rey, Richardot kaj Warnier, kaj *la duono* estis nia Prezidanto, kiu kaŭze de lia vespera kurso en la Conservatoire des Arts et Métiers, venis nur post la manĝo. S-oj Cart, Chavet kaj aliaj sendis leterojn por esprimi siajn bedaŭrojn, ke ili ne povis ĉeesti. Sed S-o Cart ho ve! skribis sian leteron... *francé!* Leginte ĝin la Prezidanto proponas al la ridantaj gruparoj, ke oni donacu al S-ro Cart « la paperan ĉapelon », kaj tuj S-o Moch fabrikas tian kapveston el unu el la menuoj, kiun oni tuj sendas al nia kara profesoro.

Post la manĝo: babilado kaj ĉarado. La vorto elektita por la ĉarado estis *aven-turo*.

1-a akto: S-o Huet profesoro, kies lernantoj malfacile kvietigeblaj estas S-oj Moch, Warnier, Chaussegros kaj Peloille instruas pri la konata temo de l'ĉevalo kiun oni manĝigas aŭ igas manĝi... *avenon*.

2-a akto: Restoracio en la Babela *turo*, kie unu Germano (Moch), unu Ruso (Detrois), unu Anglo (Lecaron), unu Franco (Warnier) vane petas en siaj naciaj lingvoj trinkaĵojn de kelnero (Bourlet), kiu nur parolas Esperanton kaj alportas plej strangajn aferojn.

Fina akto: Iu sinjoro (Bourlet) vizitas sian amikon (Bricard) al kiu li rakontas la strangegan *aventuron* de tiu sinjoro, kiu edziĝinte je la patrino de la edzino de sia patro, fariĝis la bopatro de sia patro, la nepo de sia edzino, sia propra avo, k.t.p...

Sonoris jam de longe la dekunua, kiam oni disiĝis.

Laŭ *Paris-Esperanto*.



LA BARĈO

Sinjoro Cart kun kelkaj « atestuloj » fondis tiun gajan amikan ĉiumonatan vespermanĝon malkaran, kiu kostas nur 2 fr. 15 kaj okazas en restoracio 18, Strato St-Martin.

Ne ĉiu havas rajton partopreni. Povas esti « Barĉano » nur tiu, kiu posedas la *Ateston pri Kapableco*. Tie oni nur parolas Esperante, kaj kiu parolas unu vorton france, tiu ricevas kiel punon « la paperan ĉapelon ». Je ĉiu vespermanĝo oni invitas iun konatan Esperantiston voĉdone balotitan.

La invitito de l'lasta Barĉado, kiu okazis la 6-an de novembro en la *Kutima Barĉejo*, estis S-o G-alo Sebert, kiu bedaŭrinde ne povis ĉeesti. Ciufoje oni elektas raportonton, kiu devos dum la sekvanta vespermanĝo raporti pri la antaŭa. La raportinto estis S-o Blangarin, kiu legis (ĉar la raportoj estas enskribitaj en *ora libro*), kiu legis plej bonhumoran rakonton. Li eĉ verkis laŭ la muziko de Deshayes la jeŝnan spritan kanton imitantan « la Vojo ». — Tiu kanto estas harmoniigita kaj hore aranĝita de S-ro F. de Ménil.

I

Sur larĝa irejo brilegas barĉejo,
Al kiu malsate ni kuras.
Simile al napo antaŭ la azeno
Al ni la plenigon ĝi montras.
Kaj nin ne allogas orumita pano,
Nek rostita koko, nek ŝaŭma ĉampano,
Ĉar bonega barĉo, zorge preparita,
Jen estas la sup' elektita.

II

Ni barĉas, kaj barĉas, neniam laciĝas,
Pri l'beto manĝata pensante.
Cent betoj manĝiĝas, mil betoj manĝiĝas,
Ni barĉas kaj barĉas konstante.

« Ho! Cesu! » ridante frenezaj admonas, —
 « Rebarçu! rebarçu! » en ventr' al ni sonas:
 « Obstine barĉejon, la beto nin benos,
 « Se ĉiam la barĉon ni volos. »

III

Se dum la somero, pro longa sekeco
 Ni bonan la beton ne havas,
 Ni dankas someron, ĉar la barĉejestro,
 Per napo la barĉon li faras.
 Ne mortos jam nia kara barĉanaro;
 Ĝin jam ne timigas la beto nek barĉo.
 Obstine ĝi barĉas, la ventron plenigas,
 Kaj nur Esperante babilas.

IV

Nur majstre, majeste, kaj ne petolante
 Manĝigas la barĉo ŝatata.
 Eĉ guto malgranda, el ĝi forŝprucante,
 Per lango tuj estas glutata.
 Ridemo, gajeco, ĝojo kaj ŝercamo,
 Jen estas la devoj de bona barĉano.
 La gaston ni amos, se li barĉaniĝos,
 Kaj kune denove ni barĉos!

Ĝin kantis nia amiko Grosset. Poste S-o Corret rakontis la ŝercan manieron uzindan por vojaĝi senpage en la Omnibusoj en Parizo; kaj fine D-o Javal donis al la kelnero lecionon de Esperanto, klarigante la uzon de l'afiksoj : bo, beto, betulo, arbo, arbeto, k.t.p.

Laŭ Paris-Esperanto.

Presejo de la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

Administrantaro : Th. Cart, prezidanto ; Paul Fruictier, delegito ;

Pro Benoit, Dro Vallienne, membroj.

Sekretario de l'adm. : V. Chaussegros. — Teknika direktoro : Lengyel Pál.

L'Imprimeur-gérant : P. Fruictier

Gazetoj Esperantistaj

L'Espérantiste, oficiala revuo de la Societo franca por la propagando de Esperanto, 24 paĝoj (formato 15 × 20) da teksto franco-Esperanta aŭ nur Esperanta, 8 paĝoj kovrilaj (nomaroj de Esperantaj verkoj kaj de ĉiuj grupoj de la S. f. p. E.) ; *Internacia Korespondado Esperanta* senpage disponebla por la abonantoj — 3 fr. 50. *Jarabono* (1-a de januaro, aprilo, julio, oktobro) *en Francujo* : 3 fr, *ekster Francujo* : 3 fr. 50 ; kun enskribo en la francan Societon 4 fr. ĉie. — Adreso de l' administracio *Louviers* (Eure) France.

Espero Katolika, 32-paĝa revuo monata tute en Esperanto, malfermata por ĉiuj. Rakontoj, artikoloj pri nuntempaj aferoj, ŝakoj, k. c. Jare : 5 fr. (en Francando 4 fr.) Presejo A. BARBOT, 15, rue Etienne Pallu, *Tours* (France).

Espero Pacifista, monata organo de l'*Internacia Societo Esperantista por la Paco* (krom avizo kontraŭa, la abonintoj estas enskribitaj kiel aliĝantoj al la Societo). — Jara abono (aŭ minimuma kotizo) : 5 frankoj. La Societo akceptas ankaŭ opajn aliĝojn. — Sin turni al S-ro GASTON MOCH, 26, rue de Chartres, *Neuilly-sur-Seine* (France).

Germana Esperantisto, organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj. Eliras 12 fojojn jare. Redaktata germane kaj esperante. Jara abono 4 frankoj. Administracio kaj Redakcio : Esperanto Verlag, MÖLLER & BOREL, *Berlin, S.*, 95, Prinzenstrasse.

La Revuo, monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D-ro Zamenhof. — Hachette & K-o, 79, bd St-Germain, *Paris*. — Jare : Francujo 6 fr., eksterfrancujo 7 fr.

The British Esperantist, oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio ; 12 paĝoj da novaĵoj k. c. anglo-Esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. Jare 4 fr. (sen Aldono, 2 fr.). — Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13 Arundel Street, Strand, London.

Tra la Mondo, tutmonda multilustrata revuo monata, tute en Esperanto. — Nuntempaĵoj, Pri Esperanto, Arto kaj Literaturo, Sciencoj, Komercio kaj Industrio, Militistaro, Maristaro, Teatro, Sportoj, Virina kaj Gejunula paĝo, Felietono, Konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Ĉiuj artikoloj estas verkitaj de anoj de l'landoj aludataj. — Jare 8 frankoj ; kvaronjare, 2 fr. 25. — Redakcio : S-ro MONTROSIER, 8bis, rue de l'Ecu d'Or, *Orléans* ; Administracio : 15, Boulevard des deux Gares, *Meudon* (S.-et-O.) France.

La Belga Sonorilo, organo de la Belga Ligo Esperantista. Eliras 12 fojojn jare. Redaktata france, flandre kaj esperante. Jara abono : 4 frankoj. — Redaktoro-administranto, al kiu oni ĉion sendu J. Coox, *Duffel*, Belgique

Internacia Revuo Medicina, monata organo por praktika medicino, redaktata en Esperanto kaj diversaj lingvoj naciaj, de diverslandaj kuracistoj. Celas ne nur la Esperantan, sed ankaŭ la kuracistan utilon. Jara abono : 7 fr. (en Franclando 6 frankoj. PARIS, 33, *rue Lacépède*.

Esperanta Ligilo, ĉiumonata revuo, TH. CART, ĉefredaktoro, 12, rue Soufflot, *Paris V* — Abonkosto : 3 fr. jare. Dua jaro (1905), n-ro 5—6 (septembro-novembro).

Esperanto, scienca kaj literatura ilustrita monata revuo. En la lingvoj Esperanta kaj hungara.
La jaran abonpagon (4 fr.) sendu al la redaktoro MARICH ÁGOSTON, Papnövelde-utcza 6, *Budapest*, IV, (Hungarujo).

Ruslanda Esperantisto, ĉiumonata organo de la Societo « Espero » en Esperanto kaj parte en rusa lingvo. — Adreso : Ruslando, *St.-Peterburgo*, B. Podjaĉeskaja, 24, la Societo « Espero ». — La jara abonpago (kune kun membriĝo en la Societon) 3 rubloj (7 fr. 50).

Juna Esperantisto, ilustrata gazeto por junuloj, instruistoj kaj Esperanto-lernantoj. Eliras monate. Literaturaĵoj, teatraĵoj, karikaturaj. Jara abono : 2 fr. 50. *Presa Esperantista Societo*, 33, rue Lacépède, Paris.

ADELBODEN, Berna Oberlando, 1350 m. s. m.

— S V I S U J O —

Plej bela kaj sunplena vintra stacio.

Ĉiuj sportoj per skioj, glitŝuoj, glitiloj

☆☆ Internacia Apoteko Th. HOPF, ☆☆

ESPER. KONSILANTO

aŭtoro de la ilustrita gvidlibreto en Esperanto

« TRA BERNA OBERLANDO »

aĉetebla ĉe

OSCAR HOPF en THUN

Svisa Esperanta Eldonejo.

Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

